Elektu ekskurson el bunta paletro!

Gvidado tra la urbocentro

La malnova centro de Berlino devenas el la mezepoko. Iom el ties atmosfero estas spirebla en la Preĝejo de Maria kaj en la kvartalo ĉirkaŭ la Preĝejo de Nikolao. Peter Kühnel gvidas vin de la Aleksandra Placo (Alexanderplatz) ĝis la Brandenburga Pordego. Pasante historiajn monumentojn laŭlonge de la Aleo Sub La Tilioj (Unter den Linden) vi povos viziti ekzpozicion pri la rekonstruota Berlina Kastelo. Vi vidos ankaŭ la supermodernajn konstruaĵojn ĉe la Placo De Potsdam (Potsdamer Platz) kaj en la nova kvartalo konstruita por la parlamento kaj registaro de Germanio

Esperanto en Berlin-Lichtenberg

For de rutinaj turismaj padoj vi ekkonas interesajn lokojn kaj konstruaĵojn, eksciante pri multaj ligoj al gravaj personoj kaj institucioj en la historio de la Esperantomovado de Berlino. Vi vizitos kvartalon kun iam avangarda arkitekturo, vidos Esperanto-domon kaj Zamenhofparkon. Survoje al la kastelo Friedrichsfelde ni pasos la naskodomon de la eldonejo Mondial, kiu nun funkcias en New York. Jen kelkaj punktoj kien gvidos Fritz Wollenberg, profunda konanto de la historio, kiu scipovas spici siajn klarigojn per distraj kaj vivaj detaloj.

Muzeo pri komputilaj ludoj

Ĉi muzeo pri la cifereca interaga distrokulturo, malfermis en 1997 la unuan konstantan ekzpozicion tiuteman en la mondo. Intertempe la muzeo prezentis jam 30 naciajn kaj internaciajn ekzpoziciojn . Atendas vin pli ol 300 objektoj en atentokapta ekzpozicia pejzaĝo ebligante lude kaj eksperimente trasperti la kulturhistorion de la komputilaj ludoj. Entreprenu distran tempovojaĝon al la ludanta homo de diversaj epokoj. Gvidos vin Chuck Smith, la fondinto de la esperantlingva vikipedio.

Kasteloj kaj parkoj de Potsdam

Unika arte farita pejzaĝo ligas la sudokcidenton de Berlino kun Potsdam, la iama rezidenca kaj kultura centro de Prusio. Sekvu la abundajn spurojn de la historio! Kun akompano de Henryk Wenzel vi trovu en arto kaj arkitekturo eksterlandajn influojn; precipe francajn, italajn, rusajn kaj nederlandajn, sed nepre ankaŭ danajn kaj polajn!

Fotis Antoine van der Meer

Tra kamparaj scenoj de verda urbo

Multajn vizitantojn surprizas ke grandan proporcion de la areo de Berlino okupas arbaroj kaj parkoj, kampoj kaj herbejoj, lagoj kaj riveroj. Sur la teritorio de la granda urbo eĉ vivas plu vilaĝoj kaj kamparanoj. La berlina arbaristo Johann Pachter gvidas laŭ varia verda itiniero ne malproksime de la kongresloko kaj klarigas interalie kiun rolon ludas la arbaro por la vivo en Berlino kiel garantianto de trinkakvo, freŝa aero kaj ripozo. En naturprotekta stacio vi povas observi nestojn de cikonioj kaj rigardi akvarion de dolĉakvaj fiŝoj. En apudakvaj situoj vi vidos la transformon de industristampitaj areoj de la Berlino de hieraŭ al afablaj kaj vivindaj kvartaloj por la dinamisme kreiva Berlino de morgaŭ.

Partneroj en Eŭropo

Komuna Esperanto-Kongreso Dana-Germana-Pola

Fotis Sarah Jane

25-a ĝis 28-a de majo (Pentekosto) 2012 Berlino, Germanio

Kongresa temo

Por realigi vere sukcesan integriĝon en Eŭropo certe ne sufiĉos la bona volo kaj klopodo de politikistoj kaj (inter)ŝtataj institucioj. Konsentite? Ĉu do ankaŭ al vi plaĉas la ideo kompletigi kaj vivigi la eŭropan mozaikon per la multaj koloroj kaj formoj de senperaj translimaj kunagadoj, kiujn kapablas entrepreni civitanaj asocioj kaj iniciatoj, lernejoj kaj fondaĵoj, urboj kaj vilaĝoj? Pri la spertoj kaj defioj de tiaj partneraj aŭ „ĝemelaj“ rilatoj ni diskutos interalie kun lokaj sociaj agantoj kaj politikaj respondeculoj. Jen ŝanco montri kiel ilian pontokonstruan laboron povas subteni esperantistoj, per ponta lingvo, kies 125-an jubileon ni festos en 2012.

Fine ankoraŭ organiza konsilo por vi: mendu vian tranoktejon jam frue; nur tiel vi povas certigi ke vi dormos je relative favora prezo kaj kongres-proksime. La berlina LKK atingis konsenton kun hoteloj kaj pensionoj, kiuj retenas certan nombron de litoj por la kongresanoj kaj faras koncerne al la prezoj specialan oferton. Do uzu tiun bonan ŝancon kaj mendu jam nun, kun la trankviliga scio, ke ĝis difinata dato eblos senpaga malmendo. Ni volonte sendos al vi detalojn de la unuopaj tranoktejoj.

Nome de la Loka Kongresa Komitato mi kore invitas vin al Berlino.Mi ĝojos se la specifaj ideo kaj etoso de tiu jubilea kongreso interesos vin kaj logos vin al partopreno.Do ĝis baldaŭ en Berlino!

Henryk Wenzel kek2012@esperanto.de

Konvenaj ejoj por nia kunvenoj

Freŝe rekonstruita arkitektura perlo, kreita de la modernisma arkitekto Max Taut ĉirkaŭ 1930, invitos la kongresanojn precipe al la grandaj vesperaj aranĝaĵoj. Tiu ejo gastigis jam en 2010 multajn Esperantoamikojn precipe el Pollando kaj Germanio dum la Festo okaze de la 150-jara jubileo de L. L. Zamenhof. Proksime de tiu halo estos je dispono de seminarioj, prelegoj kaj fakaj kunvenoj alia, pli juna ekzemplo de kreiva arkitekturo. Oranĝerio estas la nomo de tiu kvartala kulturcentro en formo de ovo.

Tranokti je favoraj kondiĉoj

Ni povas peri tranokteblecojn en diversaj prezogrupoj kaj en agrable proksima situo. Hotelaj ĉambroj (ĉirkaŭ 30 € por nokto kaj persono) kaj dorsosakula gastejo (ĉirkaŭ 10 €) disponeblas en distanco inter 1000 kaj 2000 metroj. Pensionoj (ĉirkaŭ 20 €) estas nur 300 metrojn for. Eĉ pli proksime estus amasloĝejo en sporta halo, pri kies luo ankoraŭ estas decidota.

Provizora programskizo

Vendrede 2012-05-25

14.00 - 20.00 akceptejo malfermita
15.00-18.00 programo por fruaj alvenintoj

20.00 Salutoj, solena malfermo,
Ekonduko en la kongresan temon
22.00 Vespera muziko kaj dancado

Sabate 2012-05-26

9.00 - 16.00 akceptejo malfermita

9.00-9.45 Asociaj estraranoj respondas al demandoj
9.30-12.00 Gvidado tra Berlin-Lichternberg
10.00-13.00 Informstando en la urbocentro
10.00-12.00 Seminario pri la kongresa temo
14.00-18.00 Prelegoj kaj fakaj kunsidoj
14.00-16.00 Gvidado tra la urbocentro
19.00-20.00 Prezento de la filmo “D-ro Esperanto”

20.00-22.00 Vespera Programo
kun danaj, polaj kaj germanaj artistoj

Dimanĉe 2012-05-27

ekde 9.00 aliĝo por la membrokunvenoj
9.30-12.00 membrokunvenoj
12.30-18.30 Ekskurso al la arbaro Spreewald
12.30-18.30 Ekskurso al Potsdam
15.00-17.30 Gvidado tra la “Pola Berlino”
15.00-17.30 Gvidado tra la Muzeo De Komputilaj Ludoj

20.00-22.00 Distra vespero

Lunde 2012-05-28

9.00-12.00 Ekskurso tra kamparo kaj arbaro
9.00-12.00 Prelegoj kaj fakaj kunsidoj

14.00 Solena Fermo